

ESPERANTISTO.

Gazeto de la lingvo internacia „Esperanto“.

Zeitschrift für die internation. Sprache „Esperanto“. | Gazette de la langue internationale „Esperanto“.

Eldonata unu fojon en la monato de **L. Zamenhof** kaj **W. H. Trompeter** sub la redakcio de **L. Zamenhof**.

Kosto por jaro (kune kun poŝta transsendo) 2 frankoj (— 1 marko 60 pfenigoj — 80 kopekoj). Kiu alsendas la pagon por 10 ekzempleroj, ricevas 1 ekzempleron senpage. Anoncoj po 5 centimoj por duonpaĝa milimetro alteco da spaco.

Kun ĉio tuŝanta la administracion de «Esperantisto» (abonoj, anoncoj, ŝanĝo de la adresoj, plendo pri nericevado de numeroj k. t. p.) oni volu sin turni al **W. H. Trompeter** à **Schalke**, Westfalie, Allemagne.

Kun ĉio tuŝanta la redakcion de «Esperantisto» (korespondoj, artikoloj, sciigoj, demandoj k. t. p.) oni volu sin turni al **Dr. L. Zamenhof** à **Varsovie**, Russie. (Li akceptas ankaŭ abonojn.)

Oni povas aboni ankaŭ en la librejo de **Heerdegen-Barbeck** en **Nurnbergo**.

No. 7.

Nurnbergo, Julio 1892.

Jaro III.

De la administracio.

La estimataj abonantoj, kiuj ricevas «Esperantisto»'n ne rekte de ni, estas petataj sciigi nin, apud siaj adresoj, de kiu ili ricevas la gazeton, ĉar ni ne bezonos nombri la rilatajn ekzemplerojn duoble, kiam ni presos la nomaron de la abonantoj. Ĝis nun ni ricevis nur malmultajn tiajn adresojn.

En la okazo, se iu havus sed mem ne bezonus la numerojn 2 kaj 3, ni estus tre dankemaj al li, se li volus havi la bonecon, sendi ilin al ni, ke ni povu ilin sendi al novaj varmaj amikoj de nia afero.

La legantoj estas petataj varbadi ĉiam novajn abonojn.

Pri la ŝanĝotajo.

Al mia demando, metita en N-oj 4 kaj 5 de nia gazeto, en la artikoloj «Ŝanĝotajo», granda parto de niaj legantoj aminde sendis al mi sian respondon kaj opinion. Jam en la nomitaj artikoloj mi diris, ke presi ĉiujn voĉojn mi ne povos, sed devos min kontentigi nur je publikigo de la rezultatoj. Cetero tia forma voĉdonado ne estas ankaŭ necesa, ĉar, kiel la legantoj memoras, la demandoj estis metitaj nur por sciigi, ĉu tia aŭ alia ŝanĝa propono trovos tian komunan aprobon de ĉiuj, por ke ni povu ilin enkonduki jam nun, ne atendente la estontan fortan kaj aŭtoritatan akademion. Pro la kaŭzoj, kiujn mi klarigis en miaj artikoloj en N-oj 4 kaj 5, eĉ negranda nombro da voĉoj kontraŭ estas jam sufiĉa, por, ĉe la nunaj cirkonstancoj, formeti dume la proponojn ĝis tempo estonta.

Por montri, ke eĉ la ŝajne plej gravaj kaj la plej ofte ripetataj ŝanĝaj proponoj ne povas ankoraŭ havi komunan aprobon kaj devas sekve esti dume formetitaj ĝis estonta tempo, se ni ne volas enkonduki en nian aferon malkonsenton kaj malordon, mi presos pro ekzemplo kelkajn

el la leteroj, kiujn mi ricevis kontraŭ la diritaj proponoj. Al tiuj, kiuj eble diros, ke, se pli granda parto donis voĉon por la proponoj, oni devas ilin akcepti malgraŭ la opinio de la pli malgranda parto, — mi respondos: jam mia senkulpa teoria propono kaj demando alportis al mi de kelkaj flankoj riproĉojn kaj malagrablajojn; kiel do jam estus, se ni volus efektive enkonduki praktike la diritajn proponojn!! Ni estas ankoraŭ tro malfortaj, por permesi al ni internan malkonsenton inter niaj amikoj; tial, se eĉ nur parto da voĉoj estas kontraŭ la ŝanĝoj, ni faros la plej bone, se ni ilin dume tute ne tuŝos, ĝis venos la ĝusta tempo.

Mi presas nur kelkajn el tiuj leteroj kaj opinioj kontraŭ la proponoj, kiuj esprimis konsilon kaj respondon; sed kelkajn leterojn, kiuj anstataŭ respondo alportis senkaŭzan koleran atakon personan, mi ne presas.

Pri la punkto 4 de miaj proponoj («k'a, k'u» k. c.) mi tute ne parolos, ĉar pli ol duono da voĉoj estis kontraŭ ili; sekve ili estas absolute ne akcepteblaj. (Kvankam la propono tute ne estis farita en unu minuto, ne pripensinte la sekvojn, kiel kelkaj amikoj pensas. La unua impresio, kiun faras tiu ĉi propono, estas la timo, ke ni ricevus konfuzon kun diversaj aliaj jam ekzistantaj vortoj; sed tiu ĉi konfuzo estas nur ŝajna, kaj tiu ĉi timo estas nur unua impresio; kiu farus vastajn provojn, tiu eble baldaŭ konvinkiĝus, ke la afero ne estas tia, kiel oni pensas, tiom pli, ke mi ĝin proponis precipe por versoj, kiuj, estante lukso, povas permesi al si dekliniĝon. Sed, ĉu prave aŭ ne prave, la pli granda parto de la amikoj donis voĉon kontraŭ la propono, kaj tial mi ĝin forĵetas). Restas paroli nur pri la punktoj 1, 2 kaj 3 (proponitaj en N-o 4), pri kiuj pli granda parto da voĉoj estas por la ŝanĝoj kaj malpli granda — kontraŭ. Sed la voĉoj kontraŭ estas ne tiel sensignifaj, por ke ni povu lasi ilin sen atento. Tial laŭ la opinio, kiun mi esprimis en miaj artikoloj, ni devas, almenaŭ en la nuna tempo, lasi tiujn ĉi proponojn ankoraŭ ne tuŝitaj.

Jen estas kelkaj el la ricevitaj opinioj kaj leteroj kontraŭ la proponoj:

Sinjoro S. A. Lundström skribas: «Je l'kauzo de Via artikolo «Ŝanĝotajo» en N-o 4 de la «Esperantisto» mi ne povas lasi skribi al Vi la sekvantajn liniojn, ĉar mi firme kredas, ke la enkondukado de la proponitaj ŝanĝoj danĝere malbonigos la lingvon. Unue Vi proponas la forigon de la oftaj «oj», «ojn», «aj», «ajn» tiumaniere, ke nur la substantivoj akceptu la finiĝojn (adjektivoj kaj pronomoj — se ili staras sen substantivo), kaj Vi donas kelkajn ekzemplojn, kiel: «mi rakontos al Vi nova tre interesa historion», «mi venis kun ĉiu mia bona infanoj». Tiuj ĉi ekzemploj ne estas bone gramatikaj, ĉar la atributo devas respondi je sia ĉefvorto; kaj, se la adjektivo povas preni la akuzativan finiĝon en kelkaj okazoj (sen substantivo), ĝi ankaŭ devas fari ĝin kiel atributo de ia substantivo en akuzativo, kiel oni ankaŭ devas diri: «novan tre interesan historion». Alie ĝi estas negramatike kaj nenature. Sed kiel mi jam antaŭe diris en unu el miaj leteroj, la aparta akuzativa finiĝo estas, laŭ mia opinio, tute sennecesa. Oni egale bone komprenus la frazon «mi rakontos al Vi nova interesa historio». Tamen la finiĝo «n» estus tre oportuna, por signifi movadon al ia loko post verboj, kiuj havas la econ signifi movadon; ekz.: iri Berlinon, veni mondon; tie, tien; supre, supren k. c. Mi tial konsilas: aŭ forigu la akuzativan finiĝon tute, aŭ ne faru eĉ ian ŝanĝon en tiu punkto. La finiĝoj «oj» kaj «aj» ne estas

malbonsonaj. Mi trovas, ke la esprimo «mi venis kun ĉiuj miaj bonaj infanoj» sonas egale bone, eĉ eble pli bone, ol «mi venis kun ĉiu mia bona infanoj». Ankaŭ la bela greka lingvo ja ofte uzas tiujn finiĝojn, kaj neniu mallaŭdas ĝin de tiu kaŭzo. Tiuj finiĝoj tial estu uzataj kiel nun — jen mia konsilo! — Tusaŭte la duan punkton, mi kredas, ke tia ŝanĝo estus kaj sennecesa kaj senutila, krom en poezio. La tria punkto pri la forigo de l'artikolo kontraŭe ŝajnas al mi tre grava. Vere ĝi estus granda faciligo por la slavoj, kiuj ne scias la uzon de l'artikolo, sed aliflanke ĝi estus por la aliaj popoloj granda malfaciligo kaj ekster tio por la lingvo mem granda malplibonigo. La lingvo ja estas tiel konstruita, ke la artikolo oftege povas esti ellasata sen neklareco, se oni ne komprenas ĝian uzon; sed aliflanke ĝi havas eksterordinare grandegan signifon, se oni komprenas ĝin ĝuste uzi. Tiuj, kiuj ne komprenas ĝian uzon, povas ĝin tial ellasi, sed tute forigi ĝin el la lingvo ne estus plibonigo, sed tute certe granda malplibonigo. Pri tiu ĉi punkto mi sekve serioze konsilas: ne faru eĉ ian ŝanĝon en la uzo de l'artikolo!»

Sinjoro Geoghegan skribas: «1) Punkto 1 (forigo de «aj», «oj» k. s.) ne tre plaĉas al mi: tiaj esprimoj («ĉiu mia bona infanoj») al mi sonoras tiel, kiel se oni tuŝus malĝustan tonon, kiam oni elsonorigas akordon en la muziko. 2) La sonoj «aŭi», «iaŭ» ne malplaĉas al mi; mi pensas, ke okazaj diftongoj donas pli multetonan karakteron al la lingvo. 3) Mi aprobas: kiu ne bone komprenas uzi la artikolon, al tiu certe la leĝoj de la lingvo ne malpermesas forĵeti ĝin el siaj skribaĵoj. — En la tuto, mi nun tiel alkutimiĝis al la sono de la lingvo, ke mi nenion volus ŝanĝi.»

Sinjoro Grabowski, kiu per si mem ĉiam estis por la diritaj ŝanĝoj (li eĉ estis la unua el ĉiuj amikoj, kiu proponis [kvankam ne postulis] la ŝanĝon N-o 1), en sia lasta vizito ĉe mi diris al mi, ke li nun iom ŝanĝis sian opinion, ĉar, komencinte pli multe uzadi la lingvon parole, li konvinkiĝis, ke la «aj», «oj», «ajn», «ojn», tute ne estas tiel malagrablaj al la orelo, kiel li en la komenco pensis teorie.

Sinjoro Trompeter diras, ke kelkan tempon li ankaŭ estis por la forigo de la artikolo «la», sed poste li ŝanĝis sian opinion.

Sinjoro Riĵkov kaj kelkaj aliaj rusaj kaj polaj polaj amikoj skribas, ke kvankam ili estas slavoj, ili tamen tute ne povus aprobi la forigon de la artikolo «la»; s-ro Riĵkov ankaŭ ne aprobas la punkton 2, dirante, ke tio ĉi sen ia utilo aŭ neceso konfuzos la regulon pri la konstanta akcento.

Sinjoro Ŝmurlo skribas, ke la nekonformeco de la adjektivo kun la substantivo (propono 1) malproksimigos nin de ĉiuj veraj lingvistoj; ke se tiuj ĉi nun nin ne aŭskultas, ili tiam havos la rajton superĵeti nin per ŝtonoj.

Sinjoro Wiens skribas: «Mi estas en tiu ĉi rilato tre konservativa; mi preferus lasi nian lingvon ankoraŭ en ĝia komenca formo, almenaŭ ĝis la lingvo estos pli disvastigita. Estas amikoj, kiuj ellernis nian lingvon sed, estante okupitaj je aliaj laboroj, ne disponas je sufiĉe libera tempo por okupadi sin je la lingvo senĉese, ili kontentiĝas, unu fojon ellerninte la lingvon, kiel ĝi estas. Laŭ mia opinio oni devas ankoraŭ meti atenton sur la malfortajn amikojn kaj malpli atenti la guston de apartaj instruituloj.»

Pli-mapli en tia sama maniero — kun diversaj dekliniĝoj, pli aŭ malpli detale, kelkaj kun tutaj serioj da aliaj proponoj anstataŭ la neakceptataj proponoj 1, 2 kaj 3 — skribis ankoraŭ 8—10 aliaj amikoj. Ĉiuj ceteraj amikoj esprimis sin por la proponoj aŭ diris, ke ili estas indiferentaj en tiu ĉi rilato.

Nun kia estas la rezultato de la faritaj proponoj? Laŭ la opinio, kiun mi esprimis en miaj artikoloj, ni devus nun akcepti, ke la propono 4 devas esti forĵetita kaj la proponoj 1, 2 kaj 3 devas esti permesitaj por prova privata uzado, sed ne esti ankoraŭ akceptitaj oficiale. Sed la maldolĉa tono, kun kiu kelkaj amikoj (kies leterojn mi ne presis) renkontis la proponojn pri la «nova lingvo Esperanto», en ligo kun la ankoraŭ ne sufiĉe forta kaj ne sendependa stato de nia afero, igas min repreni miajn proponojn kaj lasi (almenaŭ de mia flanko) la lingvon tute en tiu formo, kiun ĝi havis ĝis nun. La provo montris al mi, ke por ŝanĝaj proponoj ne venis ankoraŭ la tempo.

Pro tiu ĉi sama kaŭzo mi nun forlasas ankaŭ la demandon pri «kiu, kia, kiela», kiun mi promesis tuŝi en nia gazeto.

Kion mi diris, estas mia persona opinio. Tiuj amikoj, kiuj ne ĉesas insisti, ke ni faru nun kelkajn ŝanĝojn en la lingvo, volu proponi tiujn ĉi ŝanĝojn en ilia propra nomo, per vojo privata, — eble ili estos en tiu ĉi rilato pli feliĉaj ol mi. Sed, kvankam mi cedis al la insista premo de kelkaj amikoj, kiuj petadis min proponi kelkajn «plibonigojn» kaj diradis, ke pro mia «obstineco» kaj pro mia «patra blindeco» nia afero ne povas bone vastiĝi, mi tamen ripetas, ke mia persona opinio, kiel la legantoj scias, estas, ke ju malpli ni tuŝos nian lingvon (almenaŭ ĝis ĝia plena fortiĝo), des pli bone.

L. Zamenhof.

La ekspozicio en Ĉikago.

Pri unu kaj tiu sama objekto ni ricevis la sekvantajn du leterojn:

I. «Kiŝinev, Majo 1892. En la jaro 1893 en Ĉikago aranĝiĝas la «tutmonda ekspozicio». Ĉiuj anguletoj de la mondo sendas tien diversajn produktaĵojn de l'arto kaj de l'industrio; la reprezentantoj de la nuntempa scienco ankaŭ sendos tien la fruktojn de la plej novaj sciencaj elserĉoj kaj eltrovoj; per unu vorto, la tutmonda ekspozicio efektive enhavos «ĉion de la tuta mondo». Tial ni ankaŭ ne devas forgesi, ke nia lingvo, havanta celon fariĝi kaj esti internacia kaj eĉ tutmonda, estu reprezentata, en tia aŭ alia formo, en tiu ĉi ekspozicio. Tie, kien kolektiĝos homoj kaj scienculoj de ĉiuj finoj de la mondo, plej oportune kaj necese devas esti ankaŭ nia lingvo. En tiu ĉi letero mi ne tuŝos ĉiujn detalojn de figurado de nia lingvo en la tutmonda ekspozicio, — mi nur siatempe ekscitas la demandon kaj momorigas al la legantoj kaj amikoj-esperantistoj, ke oni devas almeti ĉiujn fortojn kaj penojn, por ke nia lingvo, lingvo internacia kaj tutmonda, okupu decan lokon en la estonta Amerika tutmonda ekspozicio. Sed ĉar ĉia afero postulas antaŭ ĉio certajn elspezojn, mi sendas al la estimata aŭtoro por kreo de necesa fondo dume 3 rublojn (La monon mi ricevis kaj transdonos ĝin al la klubo, kiu volos preni sur sin la aferon. L. Z—f). La legantoj kaj amikoj de nia lingvo, mi povas esperi, donos helpan manon kaj per

komunaj fortoj — mono, konsiloj, montroj — subtenos kaj efektivigos la montritan celon. A. G—d.»

II. (Sendita cirkulere al multaj amikoj). «Nürnberg la 25-a Majo 1892. Tre estimata Sinjoro! En la gazeto «The Herald» oni trovas unu artikolon pri la projektita ekspozicio tutmonda en Ĉikago. Ĝi estas skribita en 25 lingvoj. Inter ili estas ankaŭ Volapük, sed bedaŭrinde oni serĉas vane la tradukon esperantan (Tute ne miro; ĉar pri nia lingvo oni en Ameriko ankoraŭ tre malmulte scias kaj pri Volapük oni ĉiam ankoraŭ kredas, ke ĝi staras en sia plena forto antaŭa. L. Z—f). Tial mi petas Vin skribi tuj al la komitato de la Ekspozicio en Ĉikago, ke la lingvo Esperanto estas proponita kiel tutmonda lingvo de la Societo Filozofia en Nord-Ameriko, ĉar la tuta mondo edukita komprenas tuj la lingvon Esperanto, sed Volapükon nur tiam, kiam oni ellernis ĝin kun grandaj penoj. Skribu al la komitato en Via propra lingvo kaj en la lingvo Esperanto. Kun kora saluto Chr. Schmidt, Spittlerthorgraben 33.— Ankoraŭ mi petas Vin rekomendu Vin kiel korespondanto senpaga al la komitato de la ekspozicio.»

Estus efektive bone, se ni povus reprezenti nian aferon en la ekspozicio en Ĉikago. La societo «Espero» en S. Peterburgo jam sciigis nin, ke ĝi prenas sur sin zorgi pri tio ĉi. Tial ĉiujn amikojn, kiuj volas helpi en tiu ĉi rilato, ni petas turni sin al la dirita societo.

Novajoj.

Eliris el la presejo la «Regularo de la Societo Espero» en lingvoj rusa kaj Esperanto. Ĝia kosto estas 20 centimoj (= 7 kopekoj). Ni enportis ĝin en la «Nomaron de l' verkoj» sub N-o 54. Oni povas ĝin venigi de la societo «Espero» aŭ de L. Zamenhof.

«Espero» sendis al ni la protokolojn de la 2-a kaj 3-a kunsidoj de sia Komitato. La esenco de la kunsidoj estis: estis difinitaj unuformaj limtempoj por la membraj enpagoj; estis decidite: aĉeti kun pli granda rabato (anstataŭ la intencita preno en komision) certan nombron da ekzempleroj de ĉiuj verkoj esperantaj kaj fondi librotenejon kaj librovendejon; presi cirkulerojn kaj plakatojn; sendi 5 ekzemplerojn de la himno de Adelsköld kun kelkaj aliaj verkoj al la Ekspozicio Internacia de Muziko en Vieno; partopreni en la Tutmonda Ekspozicio en Ĉikago. Por diversaj elspezoj la Prezidanto proponis al la Komitato prunte 100 rublojn, kiuj estis akceptitaj kun danko. — La sekretario raportis, ke el 12 rubloj, oferitaj private de s-roj F. de Kanaloŝŝy-Lefler, N. Halle, A. Forell, V. Terentjev kaj J. Beker, por 10 rubloj estis presitaj anoncoj en la gazetoj «Pravitelstvennij Vjestnik», «Novoje Vremja», «Svjet», «Helrold» kaj «S. Peterburgskij Listok» kaj 2 rubloj restis por la kaso.

Sinjoro Chr. Schmidt skribas al ni, ke en Erlangen ekzistas nun klubo Esperanista, kies prezidanto estas s-ro Fr. von Briesen, kaj ankaŭ en Schweinfurt, kies fondintoj estas s-roj: P. S. Kramer, komercisto; K. Kirchner, oficisto; Karl Brand, instruisto.

Sinjoro A. Martakov petas nin sciigi, ke en la nombron de esperantistoj-anoncantoj enskribiĝis s-ro J. Puĉkovski el Kjahta por 3 anoncoj en jaro.

Sinjoro W. H. Trompeter proponas, ke, pro oportuneco de korespondado, ĉiuj kluboj, almenaŭ la venontaj, sin nomu ĉiuj tute egale «Esperanto». — Li proponas ankaŭ, ke oni akceptu «e» anstataŭ «kaj», «z» anstataŭ «s» en la komenco de silaboj (ekzemple «zabl, zal, zam, zed, zen» k. c. anstataŭ «sabl, sal, sam, sed, sen») kaj ke oni enkonduku apartajn vortojn por la germanaj «mögen, dürfen, sollen» (Mian personan opinion pri tiaj ŝanĝoj mi jam esprimis en miaj artikoloj «Ŝanĝotaĵo» en la pasinta kaj nuna jaro [pri «e» kaj «mögen, dürfen» mi eĉ parolis speciale en N-o 7 de 1891 kaj en N-o 4 de 1892 en la respondo al s-ro F. L.]. Mi ne vidas ankaŭ sufiĉan kaŭzon, kial ni devus ŝanĝi la ĉiukonatan formon en la vortoj kun komenca «s», en kiuj ni ja tute oportune povas elparoli la akran «s» [= la germana «ss»]. Tamen laŭ la deziro de s-ro Trompeter mi prezentas lian proponon al la juĝo de niaj amikoj, kun la peto sendi ilian opinion pri la diritaj punktoj rekte al s-ro Trompeter. L. Z—f.)

Ni ripetas nian peton, ke la amikoj, disdonantaj aŭ dissendantaj lernolibrojn, skribu aŭ stampu sur angulo de la blanketo, aldonita al ĉiu lernolibro, sian nomon, por ke ni pri ĉiu nova esperantisto sciu, kiu lin altiris aŭ de kiu li sciigis pri nia lingvo.

En la lasta tempo la sekvantaj gazetoj parolis pri nia afero (ni parolas nur pri tiuj gazetoj, kiujn ni ricevis): «Novoje Vremja» No. 5811 (unua oficiala kunveno de la «Espero») [A. Burenkov; V. Terentjev]; «Novosti» I No. 122 (tio sama) [A. Burenkov; K. Hübert]; «S. Peterburgskij Listok» No. 121 (tio sama) [A. Burenkov; V. Ŝmurlo]; «Sin Oteĉestva» I No. 120 (tio sama) [A. Burenkov]; «Bayerische Lehrerzeitung» No. 17 (respondo de la redakcio, rekomendanta nian lingvon kaj la verkon No. 43) [Chr. Schmidt]; «Odesskij Listok» No. 119 (malfermo de la «Espero») [A. Grünfeld]; «Sin Oteĉestva» II No. 122 (tio sama) [A. Grünfeld]; «Sin Oteĉestva I» No. 122 (tio sama) [A. Burnovski]; «Schweinfurter Tagblatt» No. 106 (transiro de la volapŭka klubo en Schweinfurt al Esperanto) [Chr. Schmidt]; «Unterfränkische Zeitung» No. 106 (tio sama) [Chr. Schmidt]; «Svjet» No. 110 (anonco de «Espero»); «Juĵanin» de 5/V [J. Feldŝar]; «Odessaer Zeitung» No. 100 (unua kunveno de l'«Espero» — de K. Hübert) [K. Hübert]; «Russkaja Ĵiznj» No. 138 (intenco de la «Espero» partopreni en la ekspozicio en Ĉikago) [J. Lojko]; «The Medium and Daybreak» No. 1153 (artikolo pri nia lingvo, kun gramatiko, ekzemploj kaj ekzercoj — de M. Fidler) [M. Fidler]; «Russkia Vjedomosti», No. 121, «Moskovskia Vjedomosti» No. 121, «Russkij Listok» No. 120, «Novosti Dnja» No. 3183 (telegramoj pri la malfermo de «Espero») [V. Terentjev]; «Nedela» No. 19 (pri la unua kunveno de «Espero») [E. Manjkovskaja]; «S. Peterburger Zeitung» No. 126 (tio sama) [V. Terentjev]; «Novoje Vremja» No. 5812 (pli detale pri tio sama) [V. Terentjev]; «Saratovskij Listok»

No. ? (pri traduko de la opero «Vivo por la reĝo» en Esperanton por la teatroj de kelkaj plej gravaj urboj en Eŭropo?!?) [D-ro J. G.]

Korespondadi en Esperanto deziras: s-roj: V. N. Devjatnin, upravlenie 5-go polic. učastka, Vilno, Rusujo kaj Johan Jegorov, Melekes gub. Samara, Rusujo.

Malgranda rusa popola kanto.

Jam malsupre suno staras,
Jam rapide vesperiĝas . . .
Kion do knabino faras,
Kial do ŝi ne montriĝas?

Ĉu patrino ne permesas?
Aŭ alia jam ŝin tenas?
Kaj ŝi dolĉe lin karesas
Kaj al mi nun ne elvenas?

Ho, knabino! per fiero
Vi fariĝis nefidela:
Kial do vi en vespero
Ne elvenis, mia bela?

Ho, karulo! tempo pasis,
Kaj ĝusttempe mi ne venis,
Ĉar gepatroj min ne lasis,
Ĉar gefratoj min altenis . . .

Ne, ne ili vin altenis!
Diru simple kaj sincere:
«Malbelulo, mi ne venis,
Ĉar ne amas vin plu vere!»

Ha, mi vidas, kion faras
Karulino malfidela:
Kun alia ŝi nun staras,
Pli feliĉa kaj pli bela . . .

J. Lojko.

En la tombo.

Kiam mi maldormiĝis kaj malfermis la okulojn, ĉirkaŭ mi estis absoluta mallumo. Mi kelkajn sekundojn kuŝis senmove, penante klarigi al mi, kie mi estas. Ĉirkaŭe estis profunda silento. Mi miris, ke mi ne aŭdas la iradon de mia poŝa horloĝo, kiun mi ĉiam metas apud mia lito sur la noktan tableton, kaj mi eltiris mian manon por preni alumetojn, sed mia mano tuj frapiĝis je ia mureto.

Tio ĉi forte min mirigis. Mi restis ankoraŭ kelkajn minutojn sen movo, penante doni al mi kalkulon pri tio, kie mi min trovas. Mi metis atenton sur tion, ke mi kuŝas sur io malmola kaj malglata: tio ĉi ne povis esti mia lito. Per la maldekstra ŝultro mi ankaŭ sentis ion malmolan. Nenion komprenante, mi volis min levi kaj mi frapiĝis per la kapo je ia baro.

Terura penso, elvokita kredeble per neklara ekmemoraro, aperis kiel fulmo en mia kapo. Tiu ĉi penso estis tiel terura, ke mi ne kuraĝis eĉ formuli ĝin. Mi eĉ timis min moveti, por ne trovi jesigon de ĝi, kaj, ferminte la okulojn, mi komencis rememoradi, kio estis kun mi antaŭ mia lasta dormo. Sed mi absolute nenion povis rememori. Mi aŭskultadis — morta silento. Mi denove malfermis la okulojn kaj denove vidis nepenetreblan mallumon. Teruro komencis min kaptadi, teruro elvokita per penso pri io, kio prezentigis al mi tute komprenebla kaj kion tamen mi ne kuraĝis eĉ nomi al mi.

Fine mi decidis levi la manojn kaj palpi tion, je kio mi frapiĝis per la kapo. Per palpo mi eksentis supre lignan tabulon kaj tiajn samajn tabulojn ĉe la flankoj kaj sub mi. Estis klare, ke mi kuŝas en alnajlita kesto. Kaj kvankam la penso pri tio ĉi ĵus senvole aperis al mi, sed la ĝusteco de tiu ĉi supozo estis tiel neatendita kaj premanta, ke mi en la unua minuto perdis ĉian kapablon konsideradi. Mi palpadis

per la manoj la muretojn de la ĉerko kaj ripetadis al mi: mi estas enterigita vive.

Kiam pasis la unua rigidiĝo, ĉe kies sola rememoro ankoraŭ nun atakas min frosto, mia unua penso estis, ke mi eble ne estas ankoraŭ enfosita, ke, se mi donos signon de vivo, oni eble aŭdos min, oni eble helpos al mi. Mi komencis frapadi en la kovrilon de la ĉerko kaj ekkriis per mia tuta forto, sed mia voĉo sonis tiel surde kaj sovaĝe, ke mi mem ekxtremis de ĝia sono. Kun streĉa haltigo de la spirado mi komencis aŭskultadi, penante kapti eĉ ian sonon el ekstere, sed mi aŭdis nur, kiel la sango kvazaŭ per marteloj batadis al mi en la tempioj. Mi ripetis kelkajn fojojn tion ĉi saman, kaj ĉiun fojon mi aŭdis nur teruran silenton. Tio ĉi estis efektive morta silento, silento de tombo, de tiu terura loko, kie la vivo ne ekzistas, kie absolute reĝas la morto. Tiu ĉi silento estis mia aljuĝo al morto, aljuĝo pli minaca, ol se ĝi estus subite elparolita per tondra voĉo, sed nur voĉo de viva ekzistajo. Ne povis esti ia dubo, ke mi estas enfosita en tombon, ke mi venis tien, kien venas nur mortintoj kaj de kie ne ekzistas reveno. Mi malvarmiĝis de teruro.

Estas io majesta, eĉ vigliga, en la trankvila konscio de neevitebleco de la morto. Tiel en la tempo de la franca revolucio centoj da homoj kun profunda trankvileco iradis sur la ekzekutejon kaj mortadis kiel herooj. Sed morti preskaŭ momente, iri al la morto, vidante super si la bluan ĉielon, enspirante la lastan fojon per plena brusto la vivigan aeron — kaj morti en malvasta kesto, enfosite en la teron, kaj esti atestanto de sia propra agonio — estas grandega diferenco. En la tombo ne ekzistas tiu vigla sento de vivo, kiu kuraĝe renkontas eĉ la ĝin neniigantan morton. La turmentoj de vive enterigita sekvas jam post la ekzekuto, kaj de ili estas liberigita ĉiu alia ekzekutita. Tiu ĉi iras en la tombon kun jam estingita konscio, en la tombon oni metas malvivulon, sed ne vivan homon. Kaj mi estis metita en ĝin viva, mi vekigis en ĝi kun pasia amo de l'vivo kaj kun la terura konscio, ke mi estas elstrekita el la nombro de la vivuloj. Inter mi kaj la vivo estis tavolo da tero, nur unu tavolo da tero, kaj nur pro tio, ke mi ne povis ĝin levi, mi devis morti. Oni devas mem travivi tiun ĉi aŭ similan staton, por kompreni, kion mi devis elsuferi ĉe tiu ĉi penso. Denove min atakis rigidiĝo, rigidiĝo de malespero. Mi kuŝis tute trankvile, kaj komencis kun malvarma sango pripensadi mian situacion. Mi enfalis en letargion, al kiu mi ĉiam havis la emon, kaj oni prenis min por mortinta. Mi kondukadis izolitan vivon kaj neniam diris al iu pri mia emo al tiu ĉi malsano. Estas vero, ke mia frato sciis pri tio ĉi, sed li loĝas en malproksimo de centoj da kilometroj kaj ne povis scii, kio fariĝis kun mi. Se li estus apud mi, li ne permesus min enterigi. Sed li ne estis, kaj oni min fermis en tiun ĉi keston kaj enfosis en profundo de du-tri metroj. Nenia sono de la supraĵo de la tero atingis al mi; sekve nenia mia krio povas atingi eksteren. Ekster tio, la mortintejo sin trovas ekster la urbo kaj prezentas tre izolitan lokon. Al neniuj povis veni en la kapon la penso, ke mi estas enterigita vive. Mi estas aljuĝita al morto — tio ĉi estas klara. Mi eĉ elkalkulis kun malvarma sango, kiun mi nun mem ne komprenas, kia maso da tero kuŝas super mi: kalkulante la longecon de la tombo du metrojn, la larĝecon unu, la profundecon du metrojn, kaj supozante, ke sur la ĉerkon falas nur duono de la tuta pezo, mi difinis, ke — se tio ĉi

havus sencon — mi devus levi pezon de pli ol 2000 kilogramoj: por tio ĉi ne estus sufiĉa eĉ la forto de Samsono. Sed kion povis al mi doni eĉ la forto de dek Samsonoj, kiam mi ne havis eĉ liberecon de movado. Mi subite eksentis, ke estas al mi terure malvaste, kaj la konscio de tiu ĉi malvasteco komencis elvokadi en mi rekte fizikajn suferojn. La penso, ke super mi kuŝas dumetra tavolo da tero, faris sur min tiel premantan impreson, kvazaŭ tiu ĉi maso premus ne sur la kovrilon de la ĉerko, sed rekte sur mian bruston. Mi komencis sufokiĝi. En teruro mi turnadis min de unu flanko sur alian, premadis per la manoj kaj genuoj la kovrilon de la malbenita ĉerko, kun kolerego penadis deŝiri ĝin, kaj fine, perdinte la fortojn, mi eletendis min sur la fundo de mia malliberejo. Larmoj de furiozeco atakis min, kaj mi ilin ne retenis.

Mallumegaj, koleraj pensoj komencis min atakadi. Por kio mi devas elportadi turmentojn, kiuj superas ĉiujn elpensojn de la inkvizicio? Kial el centoj kaj centoj da miloj mi sola, ĝuste mi, ricevis ilin, mi, plena de fortoj, espero, atendoj? Mi kuŝas sub la tero kaj devas kalkuli la minutojn, kiuj apartigas min de la morto, vidi kiel ĝi pli kaj pli proksimiĝas al mi, dum dekoj da miaj konatoj senzorge babilas, gajas kaj tiel same malmulte pensas pri la morto, kiel malmulte ankaŭ mi pensis kiam mi estis inter ili. Ili vivas, kaj mi ne sole estas fordonita al la morto, sed estas ankoraŭ elmetita al la plej rafinitaj suferoj, kiujn nur povas havi homo. Kie estas la justeco, mi demandadis min, kaj mi ne povis ne vidi, ke ne ekzistas situacio, en kiu la senceco de simila demando estus pli klara ol en la mia. Pri kia justeco povas esti parolo tie, kie la aferon decidus okazo? Ĉu ne per ia fatala malkompreniĝo mi troviĝis tie, kie pli ĝuste devus sin trovi multaj el la restintaj sur la tero? Okazo, blinda okazo ludas kun ni, kaj ĉiuj ni estas tiom miopaj aŭ malkuraĝaj, ke ni ne vidas tion, kio frapas al ĉiu en la okulojn. Sur ĉiu paŝo ni mensogas al ni, trompas nin mem, kaj ĉio tio ĉi nur por fine diri al ni mem, ke ni estis memvolaj blinduloj. Por kio? En tiu ĉi minuto mi malamamis tiun saman vivon, al kiu mi ĵus tiel pasie min ŝiris. Se mi ne estus naskita, mi diris al mi, mi nenion perdus kaj senfine multe gajnus jam per tio sola, ke mi ne suferus tion, kion mi devis suferi nun. Kaj tion ĉi, kion mi nun elportas, mi dankas al tiu krima malŝato, kun kiu la homoj sin tenas rilate la morton de alia, al tiu malnobla rapideco, kun kiu ili penas liberiĝi de siaj mortintoj. Senpotenca kolero min sufokadis, kolero kontraŭ la societo, en kiu estas eblaj tiaj okazoj, kontraŭ ĝiaj moroj, kontraŭ ĉiuj vivantaj, kontraŭ la tuta mondo.

Ĉio estis finita kun la vivo: mi pli ne apartenis als ĝi. Tie, supre, ĝi bolas, kiel ĝi bolis milojn da jaroj antaŭ mi, kaj kiel ĝi daŭrigos boladi post mi. Kio ĝin interesas, ke unu el ĝiaj portantoj estas ĵetita inter malvivulojn kaj post kelkaj horoj mem fariĝos malviva? Kion signifas por ĝi aparta persono? Milionoj da homoj mortadis antaŭ mi kaj milionoj deirados en la profundaĵon de la mortintejo post mi, kaj novaj milionoj, plenaj de pasio de vivo, okupados ilian lokon, kiel unu vico da ondoj anstataŭas la alian sur la supraĵo de la akvo. Mi ekmemoris la vortojn de Schopenhauer: la naturo zorgas nur pri la gento; la individuo estas por ĝi nulo. Kaj nur tie ĉi, en la mallumo de la tombo, forgesita de la vivo, kiu tute ne interesis sin je mi, mi komprenis la tutan maldolĉan ĝustecon de tiuj ĉi teruraj vortoj. Mi estas nulo por la naturo, kaj al ĝi estas tute egale, ĉu mi volas aŭ

ne volas morti: laŭ ĝiaj leĝoj mi devas morti, sufokiĝinte de manko de aero. Por kio do estis tiuj jaroj de ekzistado tie, sur la supraĵo de la tero, jaroj plenaj de neefektivigintaj revoj, suferado, obstina batalado por la rajto vivi kaj maloftaj, maloftaj lumaj minutoj? Kian celon, kian sencon havis tiu komedio, kiu finiĝis per tia monstra fino? Tiu ĉi demando, kiu maltrankviligas ne multajn kaj eĉ de tiuj estas forĵetata kiel sencela, por mi, viva malvivulo, montriĝis sole ne senenhava demando. La tuta estintaĵo subite kun frapanta klareco leviĝis antaŭ mi; pentraĵoj el la estintaĵo pasis unu post la alia, kaj eĉ la plej palaj el ili elnaĝadis el la profundo de la senkonscia memoro kun tia klareco, kia ordinare estas ebla nur por impresoj de hieraŭ. Mi kuŝis, ferminte la okulojn kaj simple vidis, kiel scenoj el mia vivo kun magia rapideco sekvadis unu post la alia. Kaj subite mi ekvidis unu el tiuj scenoj, kies memoron oni ordinare pelas de si kaj kies rememoron oni ĉiam penas silentigi en si kaj kiuj en tiaj minutoj, kiajn mi nun travivadis, kun aparta forto eliras eksteren. Prezentiĝis al mi malbela sceno el la tagoj de mia juneco: mi, kolerigita per io tute flanka, senkompate batis mian hundon. Tiu ĉi hundo distingadis sin per granda kvieteco kaj sincere min amadis. Kaj mi ekvidis ĝian kvietan vizaĝon kun esprimo de sufero en la okuloj, kaj tiuj ĉi malgajaj okuloj bruligis min per silenta riproĉo, kaj mi sentis per la brulado de la vizaĝo, kiel koloro de honto denove ĝin kovris. Se krimo estas elaĉetata per turmento de la konscienco, mi fine elaĉetis tiun ĉi abomenan agon per tiaj minutoj da maldolĉa honto kaj brula sufero, kiajn mi neniam volus travivi denove. Per nekredebla streĉo de la volo mi forpelis de mi tiun ĉi teruran vidaĵon kaj koncentris mian atenton sur novaj figuroj kaj pentraĵoj. Mi vidis min jen kiel infanon, ludantan sur la korto de nia malnova domo, jen kiel knabon sur la benko de lernejo, jen kiel jam grandan homon — en la vojo, sur la ĉaso, en mia oportuna kabineto, el kie mi estis elportita kiel mortinto per la manoj de vivantaj. Kun aparta heleco prezentiĝis al mi du pentraĵoj: unu el la nemalproksima estintaĵo, la alia el mia infaneco. Mi vidis la arbaron, en kiu mi ofte ĉasadis antaŭ du jaroj, kaj subite blovis sur min malseka malvarmeto de ĝia densa internaĵo kaj ĝia potenca saniga aromato, kiun mi kun tia amo tiel avide enspiradis, kiam mi tutajn horojn vagadis en ĝi. Mi vidis ĝin en varmega tagmezo kaj en vespero, kiam la lastaj radioj lumis sur ĝia supro, kaj tiu ĉi detalo de sia flanko elvokis unu el la plej fortaj impresoj de mia infaneco. Mi ne scias kial, sed en mia infaneco la subiro de la suno ĉiam metadis min en silentan malgajon. Mi rampadis sur la tegmenton de la kelo kaj observadis de tie, kiel la estingiganta suno malrapide kaŝadis sin post la najbaraj konstruoj, kaj ia stranga maltrankvileco min atakadis. Mia imago pentris tiun ĉi scenon kun tia forto, kvazaŭ mi alestus ĉe efektiva subiro de la suno. Kaj subite la antaŭa sopirado denove venis al mi kaj mi denove eksentis, la tutan teruron de mia situacio. Mi denove eksentis, ke estas al mi malvaste, ke mankas al mi lumo kaj aero, kaj mi denove komencis sufokiĝadi.

Mi kuŝiĝis sur flankon kaj komencis aŭskultadi. Por kio? mi demandis min mem: tute egale mi nenion povis aŭdi. Ĉu estas tago a nokto tie, supre? Mi ne sciis tion ĉi kaj ne povis sciigi. Surda, premanta silento kaj absoluta mallumo ĉirkaŭis min. Sur la tero eble eĉ estis tago, sed ĉe mi estis netrapenetrebla nokto. Sed se supre estas tago, iu povus viziti la mortintejon, eble povus aŭdi bruon el mia

tombo kaj en tia aŭ alia maniero doni al mi helpon. Mi tre bone konsciis, ke tio ĉi estas simple infana penso, ke neniu povis min aŭdi, kaj tamen mi pasie min alkroĉis al tiu ĉi mizera lumeto de espero. Mi denove komencis batadi per la manoj kaj piedoj en la kovrilon de la ĉerko, akompanante mian frapadon per tia ĝemado, kiu kredeble tre malofte eliras el homa brusto, — kaj denove mi havis kiel respondon mortan silenton. Tio ĉi daŭris tiel longe, ĝis mi absolute perdis la fortojn. Atakis min sento, al kiu mi eĉ ne povas trovi nomon. Tiu ĉi miksita sento de sopiro, teruro, senhelpeco kaj malespero estis en tia grado monstra, ke mi ekploregis, kiel infano.

La morto, malbela morto, per grandaj paŝoj proksimiĝadis al mi, kaj mi per nenio povis haltigi ĝian proksimiĝadon. Oni ne devas pensi pri ĝi, mi diris al mi; oni devas pensi pri io alia. Sed pri kio mi povis pensi? Pri la vivo? Ĝi ne ekzistis por mi. Pri rimedoj de eliro el tiu ĉi fosoj? Eliro estis neebla. Laca de sopira malespero kaj de sovaĝaj sintiroj al la vivo, mi devis morti, sufokiĝinte en mia tabula malliberejo. Mi ne povas diri, ke mi tremis antaŭ la morto, kiel antaŭ fakto de neniigo. Mi volis vivi, sed ĉe sia tuta forto tiu ĉi deziro ne povus tute mortigi en mi tiun fizikan kuraĝon, kun kiu homo povas pli aŭ malpli trankvile atendi neeviteblan morton. Mi estis trankvila ĉe la penso, ke post negranda spaco da tempo por mi venos la stato de neestado; sed tiu cirkonstanco, ke mi devis pereji ĝuste tiel kaj ne alie — premis min. Terura estis por mi ne la morto mem, sed la maniero de morto. Sur la supraĵo de la tero mi povus renkonti ĝin kun deca firmeco: mi havas kaŭzon pensi tiel; tie ĉi sur la fundo de superŝutita fosoj, mi sentis min disbatita, dispremita, turnita en nenion. Mi eĉ mem volis ĵeti min en la brakojn de la morto, vidante en ĝi la solan eliron el miaj suferoj: aperis al mi penso de propravola ĉesigo de ili. Mi rememoris, kiel unu Roma hetero, en la reĝado de Nerono, kulpigita pro politika krimo, sufokis sin mem per nazotuko, kiam oni ŝin, lacan de turmentoj, portis sur seĝo por novaj turmentegoj. La penso pri tia rimedo de liberiĝo eĉ ekstremitis min de ĝojo, kiel ekstremitas malliberulo ĉe la sciigo de liberiĝo. Mi devis havi sur mi zonan rimenon; mi povis fari el ĝi maŝon kaj sen ia kuraĝeco sole sub la premo de malespero, sufoki min mem. Sed mia ekzekutado iradis kvazaŭ laŭ antaŭe pripensita plano: mi ne trovis sur mi la rimenon. Tio ĉi estis ankoraŭ bato, kiu ĝis fino min dispremis. Mi ekgrincis per la dentoj de furiozeco; mi ruladis min en mia malvasta kaĝo, batante mian kapon sur ĝiaj muretoj, ne sentante doloron, kiun mi ne sentis eĉ tiam, kiam mi en blinda kolerego komencis mordadi miajn manojn. Mi ĝemadis, kiel vundita besto, sed tiajn ĝemojn, miksitaĵojn kun tiuj frenezaj malbenoj, kiuj flugadis de mia lango, ne facile povas elvoki el homa brusto fizika doloro.

Tia turmentego ne povis longe daŭri: per rapidaj movoj mi elvokis fortigitan enspiradon de aero, kaj baldaŭ laŭ la premanta pezo en la brusto mi eksentis mankon de ĝi. Tiun ĉi fojon ĝi jam ne estis frukto de la imago: mi efektive komencis sufokiĝadi. Terura sonorado estis en miaj oreloj; ĝi plenigis per si la tutan ĉerkon; ĝi sonoris kiel la bruoj de centoj da sonoriloj. Fajraj rondoj sin montradis antaŭ miaj okuloj, fariĝante pli kaj pli grandaj, fornaĝante ien en malproksimon kaj turniĝante en gigantajn ringojn, kiuj brilis per minaca sanga lumo. Mi sentis, ke mia saĝo komencas malklariĝadi. La pensoj, kiel rapidega

vento, flugadis tra mia kapo. Rememorigis al mi ial diversaj instruoj pri la ĉiopova potenco de la volo, kaj ŝajnis al mi, ke, se mi pasie ekdeziros eliri en la aeron kaj liberecon, mi en ia maniero povas liberiĝi. Kaj, kunpremite la dentojn, mi penis koncentri mian tutan volon sur tiu ĉi punkto. Poste al mi, la nekredanta, aperis la penso, ke oni devas preĝi kaj ke tio ĉi necese min savos. Mi komencis elparoladi preĝojn, sed baldaŭ mi rimarkis, ke tio, kion mi kun febra varmego paroladis, estis ne preĝo, sed senliga kolekto da fragmentaj frazoj el diversaj preĝoj. Kaj mi diris al mi, ke tiel oni ne povas preĝi, ke tia preĝado nur kolerigos Dion. Subite mi aŭdis la demandon, elparolitan per raŭka interrompita voĉo: «Por kio?» Tio ĉi iom revenigis min al la efektiveco. Mi faris penon rekonsciiĝi, kaj mi rimarkis, ke en mi turnas sin la penso: por kio Dio min tiom persekutas, kaj ke tiun «por kio» mi, aŭ pli ĝuste mia lango, ripetis kelkajn fojojn laŭte. Sed tio ĉi estis la lasta peno; mi komencis perdadi ĉian kontrolon super mi. Sovagaj pensoj komencis intersanĝadi sin kun sovagaj pentraĵoj. Grandega turo staris super mi, kaj tiu ĉi turo kun bruego falis, kaj mi volis kuri de sub la grandegaĵo, kiu flugadis sur min, kaj tiu ĉi grandegaĵo min jam atingadis... Kaj monstroj peladis min, mi faladis kaj subiĝadis en senfundan profundajon... Grandega martelo komencis batadi sur mian bruston, kaj mi sentis, kiel mia brusto enplatigadis, kaj la batoj de la martelo terure tondris en miaj oreloj. La batoj fariĝadis pli fortaj kaj pli fortaj, kaj nigra nubo ĉiam pli kaj pli min enkovradis... Mi perdis la konscion.

Malfermite la okulojn, mi ekvidis lumon kaj ies konatan vizaĝon, klinitan super mi. Tio ĉi estis la vizaĝo de mia frato, al kiu mi dankas mian savon. Sciante mian emon al letargio, li tuj post la ricevo de telegramo pri mia supozita morto elveturis el sia urbo. Sed ĉar la telegramo, sendita de unu nia komuna konato, estis sendita nur la duan tagon post mia supozita morto, li malfruis kaj alveturis kelkajn horojn post mia enterigo. Mi restis sub la tero ĉirkaŭ ses horojn, sed mi ne povas diri, kiom da tempo pasis inter mia vekigo kaj svenigo: por mi ĝi estis kaj restos senfine longa. Ĉu tio ĉi estis horoj aŭ minutoj, — al mi, tute egale, ili ŝajnas jaroj, kaj ĉe la sola rememoro pri ili mia sango glaciigis. Mi ne sole vidis la morton vizaĝo kontraŭ vizaĝo, — mi estis en ĝiaj brakoj, kaj tiuj ĉi brakoj estis teruraj, monstraj. Mi estis enterigita juna kaj eliris el la tombo preskaŭ maljunulo.

N. Borovko.

El la mondo.

La plej profunda puto. Unu amerika societo por ekspluatado de petrolo posedas nun puton, kies profundeco estas pli ol 1000 metroj; ĝia diametro estas 18 centimetroj. Tiu ĉi puto trapenetris jam la tavolojn de karbo, de orporta kvarco, de fero kaj de aliaj metaloj. Kiam ĝia profundeco atingos 1500 metrojn, la amerika registaro prenos sur sin ĝian pluan ekspluatadon kaj sondadon por celoj sciencaj, profundigante ĝin ĝis la lastaj limoj de ebleco.

Per lokomotivo al la poluso. La ĝisnunaj esplorantoj de la ĉirkaŭaĵoj de la polusoj, entreprenante siajn ekspediciojn, uzadis ordinare ŝipojn, ŝipetojn, glitveturilojn kaj glitilojn. Nun naskiĝis tute nova ideo

atingi la nordan poluson per helpo de lokomotivo. S-ro Damaskin, instruisto de matematiko en gimnazio en Atenoj, decidis efektiviĝi tiun ĉi intencon. La lokomotivo, kiun li proponas, diferencas de aliaj: ĝi enhavas meĥanisman, kiu permesas al ĝi labori sur la spegula supraĵo de la tero subpolusa; la reloj entrancigatas en la glacieron per helpo de aparta meĥanismo, kaj sur ili la lokomotivo povas sin movi antaŭen. Post la lokomotivo iros nur unu vagono, hejtata per ĝia vaporo kaj enhavanta provizojn da manĝaĵo kaj aparatojn fizikajn. S-ro Damaskin pensas, ke, elveturinte el Spicbergo, kiu sin trovas en malproksimo de ĉirkaŭ 1000 kilometroj de la poluso, li atingos la celon de sia vojaĝo pli-malpli en la daŭro de 20 horoj, ĉar la maŝino devas trakuradi 50 kilometrojn en horo.

La kavaliroj de laboro. Bonegan rilaton inter la kapitalo kaj la laboro Ameriko dankas al modela, prudenta kaj forta organizacio de ligo de laboristoj, kiu, portante la nomon «Knights of Labor» («kavaliroj de laboro»), tenas sin kiel eble plej malproksime kaj plej singarde de ĉiaj aferoj politikaj kaj religiaj kaj okupas sin malvarme kaj objektive nur je la ekonomiaj interesoj de la laboro kaj ne forgesas eĉ unu momenton, ke ĝia harmonio kun la kapitalo estas angula ŝtono de ambaŭflanka bonstato kaj kontenteco. La ideo de tiu ĉi organizacio, kiu havas centran administracion en Filadelfio kaj sekciajn en ĉiu fabrika distrikto, venis de unu tajlora submajstro en Filadelfio kaj akceptiĝis tiel bone, ke nun, post ses jaroj, la ligo havas jam 3 milionojn da membroj, tenantaj sin en plena solidareco kaj senkondiĉa obeado al siaj elektitoj, kiuj sidas en la centra administracio, kiu, malvarme salajrata, plenumas siajn devojn akurate, prudente kaj singarde. Ĉiu membro pagas semajnan enporton, kaj el tiuj ĉi enportoj estas formata fondo por kovrado de la kostoj de administracio kaj rezerva fondo por ĉiaj neantaŭviditaj bezonoj, kiuj kreskas ĉiujare tre forte. La ĉefo de la administracio estas de la komenco sinjoro Powderly, kun la titolo de «granda majstro de la kavaliroj de laboro» kaj kun 60 000 frankoj de jara salajro. Oni ne devas miri tiun ĉi altecon de salajro, ĉar la amerikanoj scias tre bone, ke malriĉeco ne permesas bone labori, ke kiu devas labori multe kaj bone, tiu bezonas vivi oportune kaj agrable kaj ne havi proprajn zorgojn sur la kapo, sed nur zorgon pri la bono komuna, al kiu li servas. Tial ankaŭ la ligo havas en la plej bela punkto de Filadelfio belegan palacon por la ĉefa administracio, kaj sinjoro Powderly havas en tiu ĉi palaco tre belan kaj oportunan privatan loĝejon. La organizacio pri kiu ni parolas, okupas la tutan nordan Amerikon de oceano ĝis oceano, de Kanado ĝis Meksiko. La komunikigo inter la ĉefa administracio kaj administracioj sekciaj estas farata precipe per telegrafo, tial estas facile kompreni, kiel glate kaj akurate la aferoj iras kaj kiel potenca estas la ligo. La ĉefa registaro de la societo de la kavaliroj de laboro ĝuas eksterordinaran aŭtoritaton ne sole inter la membroj de la societo, sed ankaŭ inter la kapitalistoj, kiuj en ĉia bezono sin turnas al ĝi kaj faras ĉion, por igi la laboristojn, kiuj ne apartenas ankoraŭ al la ligo, aliĝi al ĝi, kio cetere fariĝas afero necesa, ĉar al izolita homo estas malfacile sin teni inter la premanta plimulto, ligita per la principoj de kavalireco de la laboro. La solidar-eco de la «kavaliroj» estas grandega kaj severe observata. Kiu agas kontraŭ ĝi, estas persekutata kaj perdas la perlaboron kaj pereas. Tiu ĉi organizacio sanigis kaj nobligis la rilaton inter la kapitalo kaj la

laboro, kreis grandegan ligojn pure ekonomian, en kiu pasioj politikaj kaj religiaj estas tute fremdaj, en kiu protestantoj, katolikoj kaj hebreoj ne enrigardas al si reciproke en la konsciencoj kaj la anoj de diversaj politikaj partioj neniam disputas pri konvinkoj kaj kandidateco, lasante tiujn ĉi aferojn por la tagoj de elekto. Plej bone ni montras la religie indiferentan karakteron de tiu ĉi ligo, kiam ni aldonos, ke la multe pli granda parto de la membroj estas protestantoj kaj la ĉefo de la ligo estas fervora katoliko.


Bagateloj.

La juĝisto de Reading. El la anekdotoj, kiuj rakontas pri Henriko VIII de Anglujo, estas nenia, kiu montras lin de aminda flanko; sed nenia estas tiel karakteriza, kiel la sekvanta. La reĝo unu tagon sur la ĉaso perdis la vojon kaj venis ĉirkaŭ tagmezo en la vilaĝon Reading. Malsata li iris al la juĝisto kaj petis manĝon kaj trinkon. La juĝisto, kiu prenis lin por simpla gvardiano, akceptis lin kore kaj donis al li sur la tablon bovan langon kaj kruĉon da biero. La reĝo manĝis kun apetito, kaj la mastro amike rimarkis: «Mi donus cent funtojn da sterlingoj, se bova lango povus havi por mi tian bonan guston kiel por Vi.» Post paso de unu semajno la juĝisto estis vokita Londonon kaj metita en malliberejon. En daŭro de ok tagoj li ricevis nur panon kaj akvon, fine la naŭan tagon oni donas al li langon de bovo kaj kruĉon da biero. La malliberulo esprimas sian miron; sed la gardisto de la malliberejo restas muta por ĉiuj liaj demandoj. Tiel la juĝisto, ne ricevinte klarigon, komencas manĝi la langon de bovo, kiu efektive havas por li tre bonan guston. Subite pordo malfermiĝas, kaj la reĝo eniras. «Mi estis Via kuracisto,» diras Henriko VIII al la surprizita juĝisto; «mi sanigis Vian malfortan stomakon. Pagu al mi sekve mian honorarion de cent funtoj da sterlingoj, kiun Vi mem difinis, alie Vi restos tie ĉi la tutan vivon.» La juĝisto pagis kaj forlasis Londonon. Kion li pensis pri la dankemeco de la reĝo, la historio al ni ne rakontas.

Problemo 7 de ŝako

de F. Möller.

Nigro



Blanko komencas kaj donas maton per la 3a iro.

Solvo

de la problemo 5:

- | | |
|-------------------------------------|----------------|
| Blanko: | Nigro: |
| 1. T. f 4 — d 4 | kiel li volas. |
| 2. donas maton laŭ la iro de nigro. | |

Solvo

de la enigmo en N-o 6:

k
m a l
m a r d o
f r a t i n o
g e r m a n u j o
s p e g u l o
o r e l o
o n i
o

Novaj Esperantistoj. (Serio VI.)

1697. Abraŝev, S. K., Slivno. Bulgarujo.
 1698. Breitschopp, Leonh., komercisto. Tunnelstr. 14. Nürnberg. Bavarujo.
 [Chr. Schmidt.]
 1699. Cubarovski, S. A., Marienstadt 3. Warszawa. Rusujo.
 1700. Denisov, E., estro de la poŝto. Privalnoje, gub. Samara. Rusujo. [D-ro J. G.]
 1701. Devjatnin, V. N., Upravlenie 5 polic. učastka. Vilno. Rusujo.
 1702. Elbl, Ernst, komercisto. Kafe Merkur III. Nürnberg. Bavarujo. [Chr. Schmidt.]
 1703. von Engel, Helene, s-rino. p. adr. komandiru 6 pont. bataliona. Novo-
 georgievsk. Rusujo.
 1704. Franz, A. Cunersdorferstrasse No. 80. Königstein. Sachsen. Germanujo.
 1705. Gagel, Jos., instruisto. Arndstr. 8. Nürnberg. Bavarujo. [Chr. Schmidt.]
 1706. Grasmück, F. Rovnoje, gub. Samara. Rusujo.
 1707. Haller, Maria, instruistino. Kazaĉja ul. dom Zejfert. Saratov. Rusujo.
 [D-ro J. G.]
 1708. Hallin, Carl, Ramsdal, S:t Anna. Svedujo. [V. Langlet.]
 1709. Himmelstern, G. S., 2^a rota 7 pont. bataliona. Novogeorgievsk. Rusujo.
 1710. Idelson, A. Nikolajev, gub. Herson, Rusujo. [J. Feldŝar.]
 1711. Jerogin, P. P. } Kuzneĉni pereulok No. 15, kv. 8. S. Peterburg.
 1712. Jerogina, A. V., s-rino } Rusujo.
 1713. Kirillov, K. F. Melekes, gub. Samara. Rusujo.
 1714. Kokoteck, M. Wschodnia 1416/70. Lodz. Rusujo.
 1715. Kommissarov, N. P. Melekes, gub. Samara. Rusujo.
 1716. Kondring, organisto. Steele, Rheinprovinz. Germanujo. [W. H. Trompeter.]
 1717. König, Adolf. Schalke, Westfalen. Germanujo. [W. H. Trompeter.]
 1718. Kosieviĉ, S. Tehnologičeskij Institut. S. Peterburg. Rusujo. [D-ro J. G.]
 1719. Krämer, Andr., instruisto. ob. Wörthstr. 8. Nürnberg. Bavarujo. [Chr.
 Schmidt.]
 1720. Krippner, F. W., profesoro de Volapük. Bundesstr. 46. Hamburg. Germanujo.
 1721. Laskin, V., instruisto. Roslavl, gub. Smolensk. Rusujo.
 1722. Lifšic, L. G., dom A. Rubina. Dünaburg. Rusujo.
 1723. Marhan, Franz, Chemiker. Schalke, Westf. Germanujo. [W. H. Trompeter.]
 1724. Meise, Adolf, Postamtvorsteher. Halle. Westfalen. Germanujo. [W. H.
 Trompeter.]
 1725. Mikjeŝin, M. O., akademiano de pentrado kaj skulptado. Fontanka 128.
 S. Peterburg. Rusujo. [J. Vilin-Beker.]
 1726. Morg, Hans, komercisto. Theresienstr. Nürnberg. Bavarujo. [Chr. Schmidt.]
 1727. Musin-Puŝkin, V. V., grafo. Nikitskij Bulvar, dom Seremetevoj. Moskva.
 Rusujo. [D-ro J. G.]
 1728. von Nida. Krupp'sche Gussstahlfabrik. Essen (Ruhr). Germanujo.
 1729. Nürnberg, A. Str. Harlampievskaja No. 101. Kiŝinev. Rusujo. [A. Grünfeld.]
 1730. Orth, Hans, komercisto. in. Laufergasse 12. Nürnberg. Bavarujo. [Chr.
 Schmidt.]
 1731. Oveĉkin, F. N. Vologda. Rusujo.
 1732. Peters, Heinrich, Muziklehrer. Gelsenkirchen, Westfalen. Germanujo.
 [W. H. Trompeter.]
 1733. Rehlen, Hermann, komercisto. Pegnitz. Bavarujo. [Chr. Schmidt.]
 1734. Richter, Leonh. Unt. Söldnergasse 17. Nürnberg. Bavarujo. [Chr. Schmidt.]
 1735. Rosauer, Rob., komercisto. Hallplatz 11. Nürnberg. Bavarujo. [Chr. Schmidt.]
 1736. Rösler, Carl, Schneidermeister. Neue Gasse 33. Nürnberg. Bavarujo. [Chr.
 Schmidt.]
 1737. Ruppert, Karl. Austrasse 12. Nürnberg. Bavarujo. [Chr. Schmidt.]
 1738. Rytel, Jan, urzednik Banku Panstwa. Chlodna 12. Warszawa. Rusujo.
 [D-ro J. G.]
 1739. Salitan, A., fotografisto. Gonĉaja ulica, sobstv. dom. Ĉernigov. Rusujo.
 1740. Sanders, pastro. Zagorodnij prospekt No. 62. S. Peterburg. Rusujo.
 1741. Sauter, Ign. Günzburg a/D. Bavarujo.
 1742. Schmidt, Franz, komercisto. Schonhoferstr. 18. Nürnberg. Bavarujo. [Chr.
 Schmidt.]
 1743. Schmidt, Ant. } Burgschmietstr. 22. Nürnberg. Bavarujo. [Chr. Schmidt.]
 1744. Schmidt, Gg. }
 1745. Schmidt, Julius, komercisto. Marienstr. 14. Nürnberg. Bavarujo. [Chr.
 Schmidt.]

1746. Schmidt, Ludw. Arth. Rothenburgerstr. 39. Nürnberg. Bavarujo. [Chr. Schmidt.]
1747. Schwarzbauer, Moritz, komercisto. Weinmarkt 14. Nürnberg. Bavarujo. [Chr. Schmidt.]
1748. Seydell, Emil, stud. pharm. Göttingen. Germanujo. [H. Ischerland.]
1749. Sprenger, Ign., Möbelfabrikant. Katharinenkl. Nürnberg. Bavarujo. [Chr. Schmidt.]
1750. Suckerow, Ludwig, Apotheker. Emmerich a. Rhein. Germanujo. [Seydell.]
1751. Trofimov, V. S. Debessi, gub. Vjatka. Rusujo.
1752. Uebelein, komercisto. Tucherstrasse. Nürnberg. Bavarujo. [Chr. Schmidt.]
1753. Ullrich, Joh., instruisto, unt. Pirkheimerstrasse. Nürnberg. Bavarujo. [Chr. Schmidt.]
1754. Utzinger, Techniker. Ohmstr. 7. Nürnberg. Bavarujo. [Chr. Schmidt.]
1755. Wagner, Hans. Karlsstrasse 19. Nürnberg. Bavarujo. [Chr. Schmidt.]
1756. Wintrich, C., doktoro. Cleveland. Ohio. U. S. Ameriko.
1757. Wisner, Jean. Webersgasse 59, St. Leonhard. Nürnberg. Bavarujo. [Chr. Schmidt.]
1758. Vittenburg, A. Bolšaja Morskaja d. No. 27, kv. 15. S. Peterburg. Rusujo. [D-ro J. G.]
1759. Vittenburg, K. dom Karabkof. Saratov. Rusujo. [D-ro J. G.]
1760. Weber, August, Lehrer. Schalke, Westfalen. Germanujo. [W. H. Trompeter.]

A n o n c o j .

La plej necesa verko por ĉiu,

kiu volas ekkoni la lingvon Esperanto:

No. 11. „Dua libro de l'lingvo internacia“ (sistemaj ekzercoj). 50 paĝoj. Kosto 65 centimoj (= 25 kopekoj).

Tre grava por ĉiuj rusaj esperantistoj:

No. 41. „Plena lernolibro de la lingvo Esperanto por Rusoj. Kun 2 vortaroj“ 75 paĝoj. Kosto: 1 ekzemplero 10 kopekoj; 25 ekzempleroj 2 rubloj.

Ĉiujn verkojn pri aŭ en la lingvo Esperanto (de kiu ajn eldonitajn) elsendas **L. Zamenhof** (Varsovio, str. Nowolipki No. 21). Kiu aĉetas por pli granda sumo, povas ricevi grandan rabaton.

La libretojn 42, 43, 52, 53 dissendas por poŝtsignoj

W. H. Trompeter, Schalke,
Westfalen, Germanujo.

100 diversajn, uzitajn poŝtsignojn de Azio, Ameriko, Afriko kaj Aŭstralio sendos por 3 frankoj

Adolf König,
Schalke (Westfalen), Germanujo.

La presejo de **W. Tümmel** en Nürnberg,

de kiu tiu ĉi gazeto estas presata,
rekomendas sin por

ĉiuj presaj laboroj.

F. Kürschner,

Kirschallee 218b, Thale a./Harz,
Germanujo,

deziras korespondadi kun esperantisto franca itala, hispana pro reciproka instruo en tiuj ĉi lingvoj.